FN PER ANC 47




# ESPERANTO NORMANDA BULTENO

.unuiĝo de la normandaj esperantistoj

• 164


TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE:

MAJO - 1989A - (PRINTEMPO 1989A - N° 79A NOVA SERIO.) -



1789 **LIBERECA ARBO** 1989

**el viaj brankoj unu ni estas !**



## UNE ACTION A MENER

Les coups-bas contre l'ESPERANTO continuent.Il ne faut pas compter sur l'actuel ministre de l'éducation nationale pour introduire l'étude de la langue internationale dans les écoles.Dans la nouvelle Europe,tout le monde devra essayer de parler une langue étrangère c'est-à-dire l'anglais! L'Espéranto,on n'en parle pas:conspiration du silence ou alors ricanements hautains.

Les élections européennes doivent être l'occasion de nous manifester. IL FAUT INTERPELLER LES DIFFERENTS CANDIDATS de toutes les listes.Il faut le faire avec diplomatie mais fermeté.Ce sera l'occasion de faire passer des communiqués dans la presse pour y affirmer nos positions. L'Europe sera-t-elle européenne ou anglo-saxonne?Coca-cola,hamburger,fast-food et musique américaine seront-ils notre menu quotidien?

Même si la politique ne plait pas à tous,il faut bien reconnaitre que les décisions sont prises par ceux qui ont le pouvoir. Il ne faut donc pas ignorer ceux qui le détiennent.

PETRO KIJO

# nia vivo

**YVETOT ...** Nia perfektiga kurso daŭre bone funkcias kun 4 lernantoj.

Prelego pri Danlando : Nia Dana samideanino, S-ino Else - Margrethe Nielsen, kiu malgraŭ sia aĝo (ŝi estas 80 jara) nun faras 2 monatan rondvojaĝon tra nia lando por prelegi pri Danlando, alvenis en Yvetot, la 27an de Februaro.

Post vizito de la urbo kaj de la regiono dum la tago, ŝi faris vespere tre interesan prelegon kun diapozitivoj pri la diversaj aspektoj de Danlando kaj pri la kutimoj kaj vivmanieroj de la enloĝantoj. S-ro Pottier tradukis en la francan lingvon por la ne-esperantista publiko. Malgraŭ la foresto de pluraj esperantistaj familioj, kiuj tiutempe feriis tre malproksime de Yvetot, proksimume 25 personoj ĉeestis la prelegon kaj multaj el ili faris demandojn al S-ino Nielsen precipe pri la vivo en Danlando, ĉu rekte en esperanto, ĉu en la franca pere de la interpretisto.

La morgaŭan matenon, S-ino Nielsen foriris al Rouen por daŭrigi sian prelegvojaĝon.

P. Pottier

**CAEN...** Proksimume 1 000 personoj vizitis ekspozicion en la hotelo publika "Escoville", centre de Caen, kiun organizis la 'Union artistique et intellectuelle des Cheminots de Caen'.

Kompreneble, kadre de tiu ĉiujara ekspozicio, aparte rimarkebla estis la budo por esperanto, bele aranĝita de la loka grupo.

**...HEROUVILLE** Tri personoj regule ĉeestas la kurson kiun organizas "Hérouville Esperanto".

Ni intencas pli serioze organizi propagandon por la venonta sezono, ĉar estas vere ke la instruanto estos de nun pli disponebla ol antaŭe. La urba strukturo por la asocioj tutcerte ebligas ĝisfundan laboron.

**VIRE ...** S-ro Legret regule informas nin pri la loka grupo de Vire. Ekzistas amika rondo kiu kuraĝe baraktas kontraŭ indiferenteco kaj ignoro. S-ro Lehericey ĉiusemajne gvidas kurson kiun ĉeestas kelkaj personoj. Lernantino estas profesoro pri la angla lingvo.

Kiel redaktoro de nia bulteno, mi deziras aldoni ke estus interese organizi renkonton en tiu agrabla urbeto kiu estas malproksima de la aliaj grupoj, sed kiu avantaĝe povus helpi la regionan asocion ĉar ĝi estas ĉe la pordo de la departemento Manche kie loĝas kelkaj unuopaj samideanoj. Piknikan renkonton en bokaĝa kampo sub la vira ĉielo...?

Lastminute : S-ro Pottier invitas ĉiujn partopreni nian Generalan Asembleon okazontan la 8an de Oktobro, en Yvetot.

Pliajn informojn kaj aliĝilon en la venonta bulteno kiun vi ricevos komence de Septembro. Viajn artikolojn mi ricevu plej malfrue komence de Aŭgusto. Dankon. Y. N.

**LE HAVRE ...** Tiun jaron, la komitato antaŭvidis du formulojn pri animado de monata kunveno. Ĉiu dumonate, oni prezentas ĉu lumbildojn, ĉu pritrakton de iu ajn alloga temo.

La unua duonjaro estis jene programita :

- januare : festokutimoj
- februare : lumbildoj pri Venizio
- marte : ĉinaĵoj kaj ĉineco
- aprile : lumbildoj pri Norvegio.

Dum majo, estos speciala organizo ĉar havranoj akceptos siajn britajn ĝemelojn.

Junie, ni biros la agadon de la jaro.

Ne gravaj manifestacioj estas antaŭvidataj, sed tamen ni fortigas niajn rilatojn. Ekzemple, pri Dalian (Ĉinio) ni interŝanĝas prezenton pri nia urbo kaj regiono. Dank'al tiu propono verkemo kaj kunlaboro konkretiĝas, malgraŭ poŝtaj obstakloj kiuj ofte malakuratigas la sendaĵojn de tiu fora lando.

S. Caron

## DALIAN, FORA HAVENO DE ĈINIO

Kiam vi alvenas al la suda pinto de la Liaodong duoninsulo, vi estas en la regiono de ĉemara urbo Dalian .

Dalian : la areo de la urbo estas 12 500 kvadrataj kilometroj, kaj la loĝantaro 4,85 milionoj.

Ĉi-tie prosperiĝas industrio kaj agrikulturo. En la haveno, la akvo estas profunda kaj ne glaciiĝas dum vintre . Estas unu el la plej gravaj havenoj en Ĉinio..

La urbo estas unu el la 14 urboj malfermataj al eksterlanda komercado. Oni povas flugi al Pekino, Shangai, Hong kong, kaj Tokio.

Notinde : Dalian nomiĝas "la hejmo de pomoj", kies produktokvanto sumas la kvaron de la tutlanda produkto. Por normandoj jen ankoraŭ bona argumento por ĝemeliĝi kun tia urbo!

Belega pejzaĝo, refreŝiga vetero allogas turistojn, kiuj volonte somerumas ci-tie.

Inspirita de "Gvidlibro pri Liaoning Provinco".

S. Caron

## NIA VIVO EN ROUEN KAJ GRAND-QUEVILLY

Petro Kijo daŭrigas sian kurson en Centre Culturel.Dek-unu gelernantoj studas fervore pere de Methode 12.Tiu kurso estas organizita de Section ESPERANTO de Amicale laique du Grand-Quevilly.

Dum monato novembro la esperantista biciklanto JORGOS estis akceptata de vicurbestro de Rouen.Li estis fotata de ĵurnalisto kaj artikolo aperis en PARIS-NORMANDIE.

En Grand-Quevilly,ni akceptis ELSE GRETE NIELSEN.La 28an de Februaro,ŝi prelegis pri KOPENHAGO kaj DANLANDO.ĉeestis la kunvenon pli ol dudek personoj.Ni tradukis franclingven ĉar la publiko konsistis grandparte el simpatiantoj kaj komencantoj.Else-Grete estas 80 jaraĝa Danino.Si estas tre vigla kaj ŝi kuraĝis dumvintre preleg-vojaĝi tra Francio.

Ni informas ĉiujn membrojn de Rŭena grupo kaj lernantojn du Grand-Quevilly ke la bicikla karavano traveturos Rouen Merkrede 5an de Julio.Ni devos akcepti la biciklantojn je la 16a horo antaŭ la urbodomo de Rouen.Ni kontaktos urbestraron kaj ĵurnalistojn.Ne forgesu tiun rendevuon.Nepre partoprenu por propagandi ESPERANTON!

Petro Kijo

.....................................................................

## solvo de la krucvortoj

| | I | II | III | IV | V | VI | VII | VIII | IX | X | XI | XII | XIII |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | I | N | T | E | R | K | O | N | S | E | N | T | O |
| 2 | M | I | R | L | I | T | O | N | ■ | Z | O | ■ | ■ |
| 3 | P | L | I | ■ | S | P | ■ | ■ | K | O | ■ | I | O |
| 4 | O | ■ | K | O | K | ■ | U | N | I | F | O | R | M |
| 5 | S | K | I | Z | I | ■ | N | E | S | A | N | A | ■ |
| 6 | T | ■ | S | I | ■ | K | U | R | E | G | ■ | D | A |
| 7 | I | S | T | R | I | O | ■ | E | T | O | S | O | J |
| 8 | S | ■ | I | I | ■ | T | R | A | ■ | ■ | P | ■ | L |
| 9 | T | E | N | S | I | O | ■ | L | E | G | I | A | ■ |
| 10 | O | K | ■ | O | N | ■ | M | A | N | I | K | O | ■ |



## LA KASISTO VOKAS VIN.

Se vi ricevas tiun bultenon,vi devas pagi abonon aŭabonkotizon .Dank' al via mono,ni povos daŭre eldoni kaj sendi al vi nian modestan ligilon. Krome,okaze de diversaj manifestacioj,ni povos propagandi por ESPERANTO.

La minimuma kotizo por 1989 estas 45 frankoj.
Skribu vian ĉekon je ordo de:
UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE  CCP 283-40 H ROUEN
Sendu vian poŝtĉekon rekte al via CCP Centro.
Sendu vian bankĉekon al la kasisto:Pierre Quillaud ,16 rue Lt Vaisseau
Paris,76120 Le Grand-Quevilly
Ni dankas vin.

Listo de personoj kiuj pagis sian 1989 kotizon la 10an de Aprilo 1989:
GeSinjoroj:MICHAUD.SERY.GIBAUX.HUET.GANDAIS.CARON.QUILLAUD.JOUVIN.LEFEBVRE MARY.NOEL.LEGRIS.PELTIER.CHALM.ALLENO.BLAISE.LONGUET.MARTIN.MAURICE.PAILLER QUILLET.RAULT.ROQUES.NICOLAS.BESSIERE.CHARRON.LEGRET.GUERRE.LEMARCHAND. GUEROULT.POULAIN.POUPINET.

## BICIKLA ESPERANTISTA KARAVANO

Junaj gesamideanoj biciklos de la 4a de Junio ĝis la 29a de Julio de ZARAGOZA ĝis KERKRUDE kie okazos la Internacia Junulara Kongreso.Ili trabiciklos Hispanion,Francion,Germanion,Nederlandon.Kelkaj,poste,partoprenos Universalan Kongreson en BRIGHTON.



Survoje,ili turismos,sportumos kaj...propagandos.
Tra nia provinco,ili haltos:Dimanĉe 2an de Julio en VIRE
Marde 4an de Julio en LE HAVRE
Merkrede 5an de Julio en Rouen
En tiuj urboj,la karavano rendevuos je la 16a horo ĉe la urbodomo.
Rezervigu tiun daton por ilin renkonti.

# TIAM, FAMIĜIS ...

## ... VER SUR MER


Tiu vilaĝo kiu enhavas proksimume 1 200 loĝantojn estas preskaŭ nekonata de la Francoj. Sed en la jaro 1927, tiam estis nur 300 loĝantoj, en kelkaj horoj, la tuta mondo ĝian nomon ekkonis.

Grava evento ĵus okazis : la alveno de aviadilo kiu transflugis la oceanon de Novjorko ĝis...ne Parizo, sed jes ja ĝis Ver-sur-Mer !

Jen la rakonto pri tiu evento.


La transatlantika flugado de la "majoro" Richard E. Byrd estis zorge preparita. Ne temis pri konkur-kurso sed pri scienca misio celinta al preparo de la estontaj komercaj flugadoj.

Tial Byrd alvokis la plej famajn fakulojn pri ĉiu fako, kaj uzis la materialojn la plej modernajn en tiu epoko.



Li elektis kiel stiristojn Bertram B. Acosta kaj Bernt Balchen kaj kiel mekanikiston kaj radionavigiston Georges O. Novile. La aernavigadon por si li gardis.

La aviadilo baptita "America" estis Fokker FVII aparato ekipita per tri motoroj Wright. En ĝi, oni instalis radioaparaton speciale pripensitan de la laboratorioj de la "maraj aferoj", kaj sistemon de aŭtomatanmesaĝelsendo.




La meteorologiaj oficistoj de Usono starigis por la unua fojo mapojn montrantajn la meteo antaŭvidojn por la vojiro. La usona radio-sekcio sin ŝarĝis transsendi al la aviadilo ĉiujn bultenojn dissenditajn de ŝipoj navigantaj en la atlantika oceano.

La ekfluga vojo de la flugkampo Roosevelt Field, apud Novjorko estis ebenigita kaj plilongigita per deklivaĵo. Tiel maniere la multpeza aviadilo povis atingi sufiĉan rapidecon por ekflugi.

La Usona Poŝtadministracio transdonis al Byrd la unuan sakon de "aerpoŝto" por Francio. La baptopatro de la ekspedicio S-ro Wanamaker komisiis al Byrd transdoni al Prezidento Doumergue la unuan usonan stel-semitan flagon.

Matene, la 29an de Junio 1927, sub pluveto, "America" stirita de Acosta lanĉis la ekflugan vojon, kaj malrapide altiĝis en la minacantan ĉielon.



Superflugante Novan Skotlandon, la aviadistaro atente provis elkovri la aviadilon de Nungesser kaj Coli, sed vane ! Ili flugis je la altitudo de 1 000 metroj, 160 km po horo. Rapide, la nuboj iĝis pli multnombraj kaj je la latitudo de Terre-Neuve, la aparato flugis en la nebuloj. Irante alten Byrd provis eviti ilin, sed pro la persistado de la aĉa vetero eĉ pli alte, kaj konstante ke benzinkonsumado pligrandiĝis, li konsultis sian teamon por decidi ĉu oni ĉesigu la ekspedicion, ĉu oni antaŭeniru ! Ĉiuj konsentis por iri antaŭen, kaj Byrd decidis serĉi favorajn ventojn. Alterne, Acosta, Balchen kaj Byrd devis stiri en densa nebulo dum pli ol 18 horoj, tamen feliĉe sen formiĝo de prujno.

Novile regule elsendis kaj ricevis radiomesaĝojn. Tiu de la ŝipo "S/S Paris" ebligis al li kalkuli la ekzaktan situon kaj konstati ke ili direktiĝis al Finistere. Tiam, Novile kontaktis Parizon kiu anoncis torentan pluvon kaj ŝtormon, kiu baldaŭ la aviadilon englutis ! Vane la stiristoj serĉis "Le Bourget" por alteriĝi...

La benzin-nivelo estante pli kaj pli malalta, Byrd decidis ne endanĝerigi la vivon de siaj kunuloj kaj elkovri alian liberan lokon. Reirante al la marbordo en la profunda nokto, ili ekvidis la radiojn de lumturo. Tiu de Ver-sur-Mer. Per lumigaj raketoj, ili heligis la marbordon, kaj ĉar li ne estis certa ke la plaĝo havas aŭ ne rokojn, Byrd ordonis al la piloto Balchen surmariĝi. Tiu sukcecis eviti kontakton tro perfortan kun akvo, nur la suaviadila ekipaĵo difektiĝis.

Kvankam preskaŭ senkonsciaj, la kvar aventuremuloj sukcesis elirigi la savpneŭmatikan boaton kaj ĝin ŝveligi. Post kunpreno de la




usona flago, ili remis ĝis la plaĝo. Estis la 2a kaj duono, la lan de Julio. 42 horoj antaŭe, ili foriris de Novjorko !


La tuta vilaĝo dormis. Post unu kilometra marŝado ili atingis la lumturon, Ties gardisto kun sia edzino gastigis tiujn neordinarajn vizitantojn.

Post kelkaj horoj, la malalta tajdo, ebligis la la reprenon de la poŝtsako kaj aliajn dokumentojn.

Tiel finiĝis malfacila flugo dum kiu la tuta teamo havis admirindan obstinecon kaj grandan kuraĝon. Ili malfermis la vojon al la komercaj flugoj permesantaj la kreon de ligiloj amikaj inter la popoloj, kaj kontri buon al paco. Sur la aviadilo oni pentris olivarban branĉeton kun la vorto "peace" (paco).

Multaj fotografiaj dokumentoj kaj kelkaj malgrandaj pecoj de "America" estos ekspoziciataj en muzeo baldaŭ kreata en Ver-sur-Mer.

G. Angenault.



**"Stafeto"-serio prezentas:**

## *Dirdri*
### *kaj la filoj de Usnaĥ*

*Adriaan Roland Holst*

Mallonga romano inspirita de keltaj elementoj, kiu disvolviĝas en Irlando.
Ĝi estas perleto sur la krono de la nederlanda literaturo, majstre tradukita de Christian Declerck.

**Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ.** 52 paĝoj, 198 bfr./10.80 gld. + sendokostoj. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.




## 62-a Kongreso de S.A.T.
## 05.08,-12,08,1989 en Illertissen - Bavario

LA KVINPETALO
internacia staĝejo de LF-koop

respondecas: Suzanne Bourot
administras: Societo Yvonne Martinot
pĉk Limoges 2408-62 H

route de Civeaux
F-86410 Bouresse (Francio)
tel. +33-49-428074

**Marjorie Boulton**

# FAKTOJ kaj FANTAZIOJ

La nun jam fama legolibro por progresantoj, speciale komisiita de UEA, kun 52 variaj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo.

*"Ĉi tiu riĉ-enhava kaj lingve bonega libro estas skribita en stilo, kiun oni sen pli povas nomi modela. Kvankam la aŭtorino klopodas por ke la libro estu gradigita de tre facila al malpli simpla, ni nenie trovas stilon infanan, nematuran kaj tedan, kiel ofte en lerniloj. Ĉi tie ni renkontas Esperanton en ĝia pura formo, klara senartifika kaj ofte tre originala."*

**H.A. de Hoog** (*Dia Regno*, n-ro 1/1985)

Eldonis Universala Esperanto-Asocio, 1984, 432p. Ilustrita de Alex Brychta. 21cm. ISBN 92 9017 028 X. Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 36,00 gld. (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).




**74-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Brajtono (Brighton), Anglio, 29 julio-5 aŭgusto 1989**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando**

**Adreso de LKK: Esperanto-Asocio de Britujo, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, Britio**



"ESPERANTO - NORMANDA BULTENO"
de L'Union des Esperantistes de Normandie.

Minimuma kotizo por 1989 : 45 frankoj. CCP 283-40 H ROUEN
Sendu vian poŝtĉekon rekte al via CCP Centro.
bankĉekon al : Pierre Quillaud
16, rue Lt Vaisseau Paris 76 120 Le Grand-Quevilly
R
Redaktas : Yves Nicolas 17-37 Quartier du Bois
14 200 Hérouville St Clair. Tel 31 95 11 81